=089.2=061:239(100) : {001.8 + 002}

EU71·7 CED

**Universala Esperanto-Asocio,**
**Centro de Esploroj kaj Dokumentado,**
**Londono.**

La 1-an de Januaro 1952 ekfunkciis en Londono nova grava institucio de nia movado: la Centro de Esploroj kaj Dokumentado de U.E.A. La celo de la Centro estas triobla: sciencaj esploroj, dokumentado kaj informado. Pere de siaj kunlaborantoj la Centro esploradoś kaj studos la Internacian Lingvon kaj ĝiajn multflankajn aplikojn sur ĉiuj kampoj de la homa aktiveco el vidpunktoj lingvistika, sociologia kaj psikologia. Apartan atenton ĝi dediĉos al la studado de la moralaj kaj intelektaj efikoj, kiujn kaŭzas la praktika uzado de la Internacia Lingvo. Ĝi ankaŭ esploradoś la eblecojn por plua utiligo de Esperanto sur la kampoj de scienco kaj arto, intelektaj interŝanĝoj, trafiko kaj komerco, k.t.p.

La branĉo Dokumentado rilatas al kolektado kaj enregistrigo de la plej gravaj dokumentoj koncerne la Internacian Lingvon kaj la Esperanto-organizaĵojn.

La rezultoj de tiu scienca-esplora kaj dokumentada laboro estos vaste utiligataj por verkado de artikoloj, kunmetado de prelegoj por diversaj okazoj, pretigado de skizoj por flugfolioj, alvokoj, broŝuroj, liverado de taŭga kaj dokumentita materialo por defendi la aferon de la Internacia Lingvo en kongresoj, konferencoj kaj en aliaj medioj, kiuj pritraktas la demandon de komuna lingvo.

La C.E.D. interŝanĝados dokumentojn kun UN, UNESKO kaj aliaj gravaj internaciaj organizaĵoj. Ĝi precipe intervenados en la internaciaj medioj, sed ĝi estos je dispono de nia tuta movado, de ĉiuj ĝiaj organizaĵoj, kiam ajn ili deziros argumenti kaj dokumenti sian aktivecon por Esperanto en diversaj medioj.

La Komitato de U.E.A. komisiis la direktadon de la C.E.D. al Prof. D-ro Ivo Lapenna, kiu plenumos tiun taskon honorofice. La Centro havas kunlaborantojn en diversaj landoj. Ankaŭ la kunlaborantoj plenumas sian laboron honorofice.

La financajn rimedojn por ekfunkciigo de tiu ĉi gravega institucio de nia movado havigis parte U.E.A. kaj parte kelkaj oferemaj esperantistoj kaj agemaj Esperanto-grupoj. La aliaj esperantistoj aŭ grupoj, kiuj deziras finance subteni la Centron kaj tiamaniere ebligi al ĝi kiel eble plej efikan realigon de ĝiaj celoj, estas petataj sendi siajn kontribuaĵojn aŭ al la Centra Oficejo de U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo aŭ al Unuiĝo Esperantista Franca, 34, Rue de Chabrol, Paris X, nepre menciante, ke la sendita financa helpo estas por la C.E.D. Fine de la laborjaro, en Junio 1952, la nomoj de ĉiuj donancintoj estos publikigitaj en la oficiala organo de U.E.A.

En ĉiuj aferoj rilate al la Centro oni sin turnu rekte al Prof. D-ro Ivo Lapenna, 300 West End Lane, London, N.W. 6.



061.22 (ISAE)

## ISAE-INFORMOJ.

76. **Kotizoj 1952.** La jarkotizo de ISAE por aktiva membro estas 12 anglaj ŝilingoj (kun Scienca Revuo). Antaŭe ĝi estis 10 ŝilingoj. En la diversaj valutoj la nova kotizo estas:

Argentino 25 pesoj, Aŭstrujo 30 ŝilingoj, Belgujo 85 frankoj, Brazilo 30 kruzejroj, Britujo specialaj kotizoj, Bulgarujo 500 levoj. Ĉeĥoslovakio 85 kronoj, Danujo 12 kronoj, Finnlando 400 markoj, Francujo 600 frankoj, Germanujo specialaj kotizoj, Hispanujo 20 pesetoj, Italujo 1000 liroj, Japanujo 600 jenoj, Jugoslavio 500 dinaroj, Meksikio 14 pesoj, Nederlando specialaj kotizoj, Norvegujo 12 kronoj, Polujo 7 zlotoj, Svedujo 9 kronoj, Svisujo 7.50 frankoj, Usono 2 dolaroj.

En Jugoslavio kaj Polujo okazis granda ŝanĝo en la valuto. Sendu kotizon kiom eble baldaŭ al la delegito.

77. Prof. F. Egami, japana delegito de ISAE, eventuale vizitos Eŭropon en julio 1952 por partopreni en la Internacia Kongreso de Biologia Kemio en Parizo kiel japana delegito oficiala.

Prof. F. Egami eldonas kaj redaktas bultenon sub la titolo Sciencisto Esperantista Japana. Aperis ĝis nun du numeroj. Prof. Sin'itiro Kawamura preparas la refondon de *Ligo de Japanaj Sciencistoj-Esperantistoj*.

78. **Jarkunveno 1952.** Ni interkonsentis kun la LKK en Oslo, ke ISAE povos havi du kunvenojn dum la 37a UK de Esperanto. S-ro Støp-Bowitz informis ke „la LKK atingis permeson de la norvega Instituto por Atomenergio, ke grupo de proksimume 20 inĝenieroj kaj sciencistoj, kiuj vere havas intereson pri tio, povos dum la kongreso en Oslo fari viziton al la uranireaktoro de la instituto". ISAE-membroj, kiuj partoprenos la kongreson, povas anonci sin por tiu vizito. La adreso estas: 37a Universala Kongreso de Esperanto, Boks 942, OSLO, Norvegujo.

79. **Konferenco de UN.** La 29.10-2.11 UN aranĝis en Parizo konferencon por neregistaraj organizoj. Reprezentanto de ISAE estis prof. d-ro I. Lapenna. Laŭ lia raporto la konferenco okazis en la palaco de Unesco. Ĉeestis reprezentantoj de ĉ. 150 internaciaj neregistaraj organizoj, kun kiuj UN havas oficialan rilaton. La oficialaj lingvoj estis la franca kaj la angla. La tradukado, laŭ d-ro Lapenna, funkciis malbone.

Oni traktis i.a. jenajn punktojn: Aktiveco de la neregistaraj organizoj koncerne la instruadon pri UN; Disvastigado de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj; La UN kaj la evoluigo de la koncepto pri la internacia solidareco; Problemoj de informado, specialaj al Eŭropo — la lingva problemo.

D-ro Lapenna atentigis pri la rolo de esperanto en internaciaj rilatoj. Li interkonsentis kun la sekretario de la Informa Departemento de UN ke la esperantista Centro de Esploroj kaj Dokumentado liveros al UN dokumentaron pri nia movado, kiuj raportoj estos resumataj en la publikigajoj de UN.